

Historio de la esperanto-movado en Svislando per tekstoj el la revuo
Svisa Espero, 14-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 759, 1978.04.26 & 28 & 29

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum prelegaro ni prezentas al vi historieton de la esperanto-movado en Svislando helpe de tekstoj, kiujn ni ĉerpas el la revuo *Svisa Espero*. Tiel ni markas la 75-an naskiĝjaron de Svisa Esperanto-Societo.

A.- La dua Universala Kongreso okazinta en Ĝenevo en somero 1906 vigligis la esperanto-vivon en Svislando kaj gajnis gravajn fakulojn al la lingvo. Ni legas en *Svisa Espero* :

Cl.- « La dua kongreso devis memkompreneble aktivigi la Esperantan movadon en nia tiel favorita urbo. Tamen dum la du semajnoj sekvantaj la kongreson, la Ĝeneva grupo ripozis, unue ĉar ĝia komitato vere bezonis ripozon, kaj due, ĉar juĝante laŭ mia propra sento nia grup-afero ŝajnis al ni tiel malgranda, tiel sensignifa, komparita kun la kunvenego kiu ĵus finiĝis. Tamen forskuinte tian malsanan senokupon, kaj memorante ke malgraŭ la deviga foriro de niaj karaj kunbatalantoj, la batalo ne ankoraŭ estante gajnita, ni devigis nin repreni niajn armilojn defendajn kaj atakajn por ke ni ne perdu la ŝajnantan profiton kiun la foririnta militistaro estis doninta al ni.

A.- La Ĝeneva grupo anoncis en la lokaj ĵurnaloj, ke la 20-an de septembro okazos en ĝia grupa kunvenejo publika konfeenco. Ni citas : Nu, kvaronon de horo antaŭ la malfermo, nia kunvenejo estis absolute plenigita je la aŭdantaro, kaj mi kontraŭvole estis devigata konsili al kelkaj amikoj ke ili foriru. Nun, la unuan fojon ni eltrovis ke nia kunvenejo estas tro malgranda. » (Fino de la citaĵo.)

Cl.- Inter la novuloj, kiuj alkuris al tiu unua kunsido post la Universala Kongreso, troviĝis René de Saussure. Tiu doktoro pri filozofio, docento ĉe la Universitato, estis membro de eksterordinara familio, kiu donis aron da mondscale konataj sciencistoj.

A.- Antaŭ ol paroli pri René de Saussure mem, ni citu la nomojn de liaj plej famaj parencoj :

Cl.- Nicolas de Saussure (1709-1790) famiĝis per siaj verkoj pri agronomio.

A.- Lia filo Horace Bénédict de Saussure (1740-1799) estis universitata profesoro pri eksperimenta filozofio ekde la aĝo de 22 jaroj. Li ludis gravegan rolon kiel naturalisto kaj fizikisto, kaj la franca lingvo riĉiĝis je du vortoj formitaj el lia familia nomo. *Saussurea* estas herba planto, kaj la esprimo *saussurisation* priskribas kemian transformon. Horace Bénédict de Saussure organizis plurajn ekspediciojn, inter ili la du unuajn grimpadojn al la supro de Monto Blanka.

Cl.- Nicolas Théodore de Saussure (1767-1845) mondfamiĝis per siaj kemiaj malkovroj kaj Henri de Saussure (1829-1905) per siaj naturalistaj laboroj.

A.- En la epoko, kiu nin interesas, la lingvistoj alkuris al Ĝenevo por sekvi la kursojn de la lingvisto Ferdinand de Saussure (1857-1913). Ankoraŭ nun oni ne povas studi lingvistikon sen dediĉi sian atenton dum longaj semajnoj al la verkoj de tiu ĝeneva sciencisto.

Cl.- René de Saussure estis la frato de Ferdinand. Ankaŭ liaj lingvaj serĉadoj ludas fundamentan rolon. Post tiuj de D-ro Zamenhof, ili estas tiuj, kiuj plej multe influis la disvolviĝon de esperanto, ĉar ili alportis firman fundamenton koncerne al la vortformado en esperanto. Ni havos la okazon paroli sufiĉe detale pri la teorio de la vortfarado de René de Saussure, kaj tiam vi komprenos ĝian fundamentan gravecon.

A.- Ne nur la inteligenteco estas je la bazo de tiu famiĝo de la membroj de la familio de Saussure. Ankaŭ la riĉeco. Tiuj sciencistoj povis sin dediĉi al la serĉado, povis organizi ekspediciojn sen financaj zorgoj. Tiu financa sekureco dekobligis la laborpovon de tiuj homoj, kiujn kune karakterizis granda malkovremo.

Cl.- Ankaŭ René de Saussure estis sufiĉe riĉa por ne devi sin ligi al profesia funkcio. Bedaŭrinde lia granda imag-povo kondukis lin senĉese iniciati novajn esplorojn, novajn agadojn, sen ĉiam konkludi la komencitajn laborojn. Tio estas la granda malforto de tiu malavara membro de la familio de Saussure, kiu ŝatis ludi rolon de mecenato.

A.- Pri tiu mecenatado de René de Saussure jen informoj, kiuj aperis en Svisa Espero. En februaro 1907 ni legas :

Cl.- « S-ro René de Saussure ... proponis starigi ... konstantan oficejon, kies direktoro li estus. Tiu oficejo kunhelpas al la redaktado de la Esperantistaj sciencaj revuoj kaj al la verkado de la teknikaj vortaroj de la lingvo Esperanto uzante por tio la kunlaboron de multaj scienculoj. ... Tiu oficejo funkcias jam de tri monatoj. ... Ĉiuj Esperantistoj, sciencamantoj aŭ sciencistoj, estas petataj aboni la Internacian Sciencon Revuon ; ili tiel kunhelpas por pligrandigi la financajn rimedojn de la Ĝeneva Oficejo, kies elspezojn pagas nur privataj monoferantoj ; nenia kotizaĵo estas trudata al la anoj de la projektita scienca asocio. ... La scienca Oficejo ricevis jam la kunlaboron de multaj Ĝenevaj scienculoj, kiuj formas la « Ĝenevan Helpan Komitaton ». Ĝia honora Prezidanto estas S-ro Ernest Naville. ... La aktiva Prezidanto estas S-ro René de Saussure, kaj la du sekretarioj S-roj Hector Hodler kaj Edmond Privat, bone konataj de la esperantistaro. En tiu-ĉi komitato ni trovas la nomojn de multaj profesoroj kaj privat-docentoj de la Ĝeneva Universitato. »

A.- Sekvas listo de 16 nomoj de scienculoj. Poste ni ankoraŭ legas :

Cl.- « Por la Redakcia Sekretariejo de la Scienca Revuo, S-ro de Saussure elektis S-rojn Muschamp kaj Théophile Renard. » (Fino de la citaĵo.)

A.- Ĉio tio signifas, ke René de Saussure ne nur gvidis la laborojn, li ankaŭ pagis ĉion. Ekde tiam Hector Hodler povis konstante labori por esperanto ricevante salajron, kiu permesis lin forlasi la gimnaziajn studojn, kiujn verŝajne li neniam finis. Ni havos la okazon paroli pri la ege pozitivaj flankoj kaj pri la mankoj de tiu neordinara mecenato.

Cl.- Sed por certa tempo ni interrompos nian prelegaron pri la unuaj jaroj de esperanto en Svislando, por povi raporti pri pli aktualaj okazaĵoj kaj por povi respondi al la leteroj de niaj geaŭdantoj.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Geaŭdantoj atentu ! Ekde la monato majo ŝanĝiĝos niaj elsendhoroj kaj tagoj. Niaj prelegoj aŭdiĝos ĵaŭde kaj sabate, kaj tiuj de d-ro Arthur Baur lunde kaj ĵaŭde. Elsendhoroj : 19a kaj 23a horoj.

A.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), septembro 2012*